Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
MondaFest' • La Monda Festivalo de Esperanto • 20 junio – 20 septembro

# Festivala Kuriero

21-a de aŭgusto 2020, numero 13
Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

## La Tago de Eŭropo

ALeks Kadar

Fermiĝis la aliĝo al la Tago de Eŭropo. Dankon al ĉiuj 100 aliĝintoj, ili jam ricevis la ligilon al la kunsidejo.

Ĉiuj ceteraj interesiĝantoj estas bonvenaj spekti la eventon en Jutubo en la kanalo de UEA, UEAviva.

Jen la rekta ligilo al la Tago de Eŭropo: youtu.be/gQTaPzdcgsw.

Ni invitas vin inviti ĉiujn aboni la kanalon de UEA en Jutubo kaj tiel neniam perdi elsendaĵon de novaj eventoj.

Ĉiuj rajtas spekti, eĉ sen ensalutado.

La plej ĝisdata versio de la programo estas en Eventa Servo: eventaservo.org/e/Tago-Europo.

La kerna programo: de la 13:00 ĝis 17:00 UTC.

La koncerto de Kajto: de 17:00 ĝis 17:50 UTC.



**Koran dankon al:**


- la Irana Esperanto-Asocio (IREA), partnero kaj gastiganto de la evento.
- la Eŭropa Komisiono de UEA pro organizado de la enhava programo;
- Luis Obando, volontula teknika prizorganto de la evento;
- ĉiuj kontribuantoj al la programo,

* ĉu per prezento de agadraporto por la sekvaj landoj: Albanio, Aŭstrio, Belgio, Bulgario, Danio, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Italio, Kroatio, Latvio, Nederlando, Pollando, Rumanio, Rusio, Ukrainio
* ĉu per prelego (Eŭropaj subvencioj, Lingvo-Festivalo, PIV-ido)
* ĉu per muziko
* ĉu per partopreno en la Eŭropa forumo.

## La Tago de Afriko

Adjévi Adjé

Fermiĝis hieraŭ la aliĝoj por la Tago de Afriko, kaj ĉiuj, kiuj sukcese aliĝis, ricevos baldaŭ unuope per la retpoŝto la alirajn informojn al la Zoom-vidbabilejo, kie disvolviĝos la tuta programo.



La aranĝo okazos inter la 11-a kaj 17-a horoj laŭ UTC dimanĉe, la 23-an de aŭgusto 2020.

Se vi deziras aliĝi kaj partopreni, sed pro iu kialo ne sukcesis aliĝi akurate bonvolu ne zorgi, la tuta programo elsendiĝos realtempe (laŭ la tempo de via komputilo aŭ poŝtelefono) per la jena ligilo https://youtu.be/4fXPa76i6jQ. Vi povos do spekti kaj re-spekti la eventon per la jutuba kanalo *UEAViva* de UEA.

Intertempe la programo de la Tago ĝisdatiĝis kaj nun afiŝeblas la plej freŝa versio per https://eventaservo.org/e/tagodeafriko

Dankon al ĉiuj aliĝintoj kaj aparte al Irana Esperanto-Asocio kaj al Luis Obando, kiuj akceptis volonte prizorgi la teknikajn aspektojn de la evento.

(Re)spektindaj prelegoj de la Virtuala Kongreso pri la kongresa temo (detale pri ĝi legu sur la dua paĝo):

- Enkonduko de Sara Spanò
- Prelego de Rakoen Maertens pri reprezentado de UEA kaj TEJO ĉe UN:
- Enkondukaj prezentoj pri la tri "kolonoj" de UN:
  - Mark Fettes pri evoluigo
  - Ulrich Brandenburg pri paco
  - Intervjuo kun Giuliano Turone pri homaj rajtoj
- Diskuto pri evoluigo kaj homaj rajtoj
- Diskuto pri la 17 Celoj por Daŭripova Evoluigo

# Kurte pri la Festivala Temo

(Informo de https://eventaservo.org)

La Monda Festivalo de Esperanto transprenis la temon de la nuligita 105-a Universala Kongreso: “**UN 75-jara: dialogo kaj interkompreniĝo en ŝanĝiĝanta mondo**”. Tiu temo spegulas la longan kunlaboran rilaton inter la Esperanto-movado (speciale UEA) kaj Unuiĝintaj Nacioj (UN) kaj same la signifon de tiu dialoga kaj mondo-pliboniga laboro de UN por esperantistoj.




La temo estis enkondukita kadre de la “Somera Inaŭguro”, la inaŭgura tago de MondaFest' 2020, la 20-an de junio (https://youtu.be/SCMdxEIu128), i.a. per: mesaĝo de la Ĝenerala Sekretario de UN, António Guterres (00:49:00), prezento de Humphrey Tonkin (00:50:25) kaj saluta mesaĝo direktita al MondaFest' de la Speciala Konsilisto Fabrizio Hochschild, respondeculo pri la 75-jara datreveno de UN (1:11:45). Ekde la inaŭguro ĝis la malfermo de la Virtuala Kongreso de Esperanto (VK), la 1-an de aŭgusto, okazis pluraj laborkunsidoj por la temo kaj pluraj agadoj rekte aŭ nerekte al ĝi rilataj, kiel intervenoj kaj prelegoj en NASK, Usona Kongreso kaj Internacia Junulara Kongreso kaj diskutado en la Facebook-grupo UN75 en Esperanto, ĉio oficiale kadre de MondaFest' 2020. Aparte dum la VK estis riĉa diskutado pri la temo dum la tagoj 1-a kaj 8-a de aŭgusto.

Nun la kunordiga teamo pri la temo (Humphrey Tonkin, Sara Spanò, Rakoen Maertens, Mark Fettes, Fernando Maia Jr., Renato Corsetti, Jon Liechty, Gadirou Diallo kaj Raúl García) esperas atingi ankoraŭ iom pli, se temas pri la profundeco de la diskuto kaj la konkreteco de la planoj por antaŭenigi la komprenon pri UN kaj la praktikan laboron por paco, homaj rajtoj kaj evoluigo inter la esperantistoj. Sub gvido de la eksprezidanto de UEA Mark Fettes okazis kaj okazos:

2020-08-17 (pasinta): **La Celoj por Daŭripova Evoluigo, grupo 1 – la socia bazo**: forigi malriĉecon, redukti socian/internacian malegalecon, disvastigi sanon, edukadon, seksan egalecon, pacon kaj aliron al justico.

2020-08-22, 18:30 UTC: **La Celoj por Daŭripova Evoluigo, grupo 2 – socia infrastrukturo**: mastrumi daŭripovan provizon de akvo, manĝaĵoj, energio, loĝejoj, laboro, kaj disvolvi daŭripovajn alirojn al produktado, konsumado, industrio kaj inventemo. https://eventaservo.org/e/CDE-grupo2. Aliĝu **ĉi tie**.

2020-08-31, 16:00 UTC: **La Celoj por Daŭripova Evoluigo, grupo 3 – protekti la naturon**: kontraŭbatali klimatŝanĝiĝon, daŭripove mastrumi la marojn kaj terojn. https://eventaservo.org/e/CDE-grupo3. Aliĝu **ĉi tie**.

La celo de tiuj kunvenoj estas kolekti kaj profundigi ideojn por la raporto kaj rezolucio de UEA al UN, kaj krei la bazon de plano por pli konstanta kaj vasta engaĝiĝo de esperantistoj kun la laboro de UN. Kvankam la deirpunkto estas la Celoj por Daŭripova Evoluigo, la laborgrupo estas malfermita al ĉiuspecaj ideoj, kiuj iel tuŝas la agadojn kaj prioritatojn de UN kaj utiligas la specifajn fortojn kaj kapablojn de la Esperanto-movado aŭ celas ĝian plifortigon kaj plikapabligon.

Se vi ne povas partopreni en tiuj kunsidoj, vi estas bonvena kontribui per ideoj ankaŭ retmesaĝe ĝis la fino de aŭgusto al la kunordigantoj Mark Fettes (mtfettes@sfu.ca), Humphrey Tonkin (tonkin@hartford.edu) kaj Rakoen Maertens (rakoen@maertens.international).

**Aperis la Unua Bulteno de la 106-a Universala Kongreso de Esperanto, Belfasto, 17–24 julio 2021.**



# Paralela Universo en Odeso

Tatjana Auderskaja

La trian sabaton de aŭgusto en la mondo oni festas "Paralelan Universon". La agado naskiĝis en Usono en 2016, kaj celas unuigi kaj interkonatigi esperantistojn, kiuj loĝas sufiĉe apude (ne pli ol 4 horojn de veturado), sed malofte aŭ neniam renkontiĝas. La programo konsistas el matena kaj vespera manĝoj, kaj inter ili – komuna vagado kaj konatiĝo kun la gastiga loko kaj inter si mem.

Paralele al tiu ideo, ni decidis subteni ankaŭ la ideon de László Szilvási pri vizitado de ZEOj. Li temis pri 21 ZEOj en Hungario; sed ni agis pli modeste, kaj proponis nur du ZEOjn, kiuj troviĝas en Odessa: la monumenton al la Majstro sur nia ĉefa Deribasovskaja strato kaj memortabulon al Vladimir Gernet en Nacia Scienca Centro «Instituto de vitkultivado kaj vinfarado je la nomo de V. E. Tairov». V. Gernet (1870–1929) estis pioniro de Esperanto-movado, fondinto kaj unua gvidanto de Odesa Esperanta klubo (1894–1897), en 1895–1897 eldonis kaj subvenciis Esperantan revuon «Lingvo Internacia», eldonatan en Uppsala (Svedio), tradukis al Esperanto verkojn de la rusa literaturo. Samtempe li estis elstara aganto de scienco, kemiisto, organizanto kaj gvidanto de unua en la Rusa Imperio Vinfarista stacio, kiu poste fariĝis Scienc-Esplora Instituto.



Tial nia junulara Esperanto-klubo «Verdaĵo» proponis al la Instituto krei kaj instali memortabulon pri tiu elstara aganto sur du terenoj, scienco kaj Esperanto. La direkcio volonte akceptis, kaj la 12-an de julio de 2011 oni solene malfermis la memortabulon en du lingvoj, la rusa kaj Esperanto. Tial en Odessa troviĝas nun du ZEOj, pri kio povas fieri nemultaj urboj en la mondo.




Do, ni decidis paraleligi paralelojn kaj okazigi PU, vizitante ambaŭ niajn vidindaĵojn. La monumenton sur nia ĉefa strato vidis ĉiuj, sed la memortabulon, kiu troviĝas apudurbe – nur nemultaj. Partoprenis 10 personoj, reprezentantoj de tri odesaj kluboj: «Blanka Akacio», «Verdaĵo», «Verda Lampo» kaj de Lucka klubo «Arbara Kanto». Ni havis tre interesan ekskurson tra la Instituto, ĝia Muzeo, abunda biblioteko kun valoraj antikvaj libroj, vinkelo, gustumada halo. Poste ni piknikis surherbe kaj parolis pri la rolo de Esperanto en niaj vivoj, kiujn ĝi plibeligis kaj faris pli interesaj kaj emociplenaj. Dankon al Esperanto pro ĉio!




Vi povas esti aŭtoro de la *Festivala Kuriero* kaj la Reta Revuo! Por kontribui, skribu al la redakcio *redakcio@revuoesperanto.org*

# Virtuala Kongreso de Esperanto kalejdoskope



Aŭtora Momento kun Mikaelo Bronŝtejn



UEAviva: 11 jarojn kaj plu



Kio estas Muzaiko?




Aŭtora Momento kun Federico Gobbo




XR: Extinction Rebellion



Aŭtora Momento kun Miguel Fernández



Telegram en Esperanto (Yves Nevelsteen)



Legado de la poemo «Ho, homaro»